nia voĉo

madrida esperanto-liceo decembro 2022

## ZAMENHOF-TAGO DENOVE EN FUENLABRADO

Alvenas decembro, kaj, kiel tradicie, venas ankaŭ la **Zamenhofa Tago**, aŭ Tago de la Libro kaj la Kulturo en Esperanto. Ĉi-jare ni denove festos en Fuenlabrado, profitante la bonegan sidejon pri kiu disponas la Fuenlabrada Esperanto-Ligo. La tago de celebrado estos la 10a de decembro, sabato, kaj ni komencos la feston je la 11a horo matene, ĝis posttagmeze.


La sidejo situas en strato Creta numero 2. La loko estas facile alirebla el aliaj urboj, ĉar ĝi troviĝas je 300 m de la haltejo "Fuenlabrada Central" de trajno kaj metroo. Ĝi troviĝas ene de la centro por edukado de plenkreskuloj "C.E.P.A. Paulo Freire" kiu konsistas el kvin konstruaĵoj. Oni devas eniri ĉe Av. de las Naciones, tra la pasejo por aŭtoj kiu kondukas al interna parkejo. Ĉiukaze, je la 10:45 iu kun verda flago gvidos homojn el la stacio ĝis la sidejo. Notu la kontaktan telefonnumeron: 647 669 726.

La programo estos detaligita en la venontaj tagoj; se vi mem deziras kontribui, skribu al madrid@esperanto.es.

Ni planas komunan tagmanĝon ĉe la loko mem. Alportu vian favoratan manĝaĵon kaj trinkaĵon, kaj ni kunĝuos en amika etoso.

Pliaj detalojn (aktualigotajn) bv legi en https://eventaservo.org/e/ZamTago2022Fuenlabrada.

## PREZENTADO DE LIBRO




La 16an de novembro okazis publika prezentado de la libro *Poesías, marchas y canciones de las Brigadas Internacionales*, kompilita de la historiisto Jacinto Arévalo. Ĝi celas diskonigi parton de la literaturo originita de la Internaciaj Brigadoj dum la hispana intercivitana milito, tiun verkitan verse, kiel poeziaĵoj, romancoj, kantoj kaj simile. Oni montras ĉ. tricent pecojn, verkitajn en la germana, franca, pola, itala, hispana, kataluna kaj aliaj lingvoj, kaj ankaŭ en Esperanto.

La libro enhavas 14 esperantlingvajn poemojn kun ĝia traduko en la hispana fare de Miguel Fernández.

Kvar esperantistoj ĉeestis la eventon. La kompilinto de la libro tre pozitive menciis la helpemon kaj kompetenton de la esperantistoj; li donacis al HEF unu ekzempleron kun dediĉo, kiu jam eniris la bibliotekon.

## LERNEJA DEBATO EN FUENLABRADO

La delegitaro por la sudo de Madrida regiono de la Universitato UNED, kune kun kelkaj urbestraroj de tiu regiono (Leganés, Fuenlabrada, Parla, Pinto kaj Alcorcón) organizas konkurson pri debato en lernejoj ("liga de debate escolar"). Okazos unue municipa fazo, dum januaro, februaro kaj marto, kun fina intermunicipa konkurso en aprilo kaj majo. Ĉiu urbo elektas propran temon, kaj la temo en Fuenlabrado de tiu unua fazo estos… Esperanto!, konkrete, la ebla rolo de Esperanto en eŭropuniaj institucioj.

La partoprenontoj devos informiĝi pri la temo, serĉi argumentojn por la debato, disvolvi kritikan alrigardon.

Ni trovis jam intereson ĉe la koncernaj mezlernejoj, kaj dum venontaj semajnoj eblos diskonigi informojn pri nia lingvo rekte ĉe junuloj. Ekzemple, estas jam planite ke nia amiko Jorge Brasal vizitos gimnazion la 19an de decembro por paroli pri Esperanto al la lernejanoj.

Plej probable necesos alia disvastigo, do, se iu el la legantoj emas paroli kun mezlernejanoj, kaj havas liberajn matenojn, bv kontakti kun la fuenlabrada grupo en la adreso esperantoesdetodos@gmail.com.

En la konkurso entute partoprenos 40 mezlernejoj, kaj do estas unu el la plej gravaj tiaj iniciatoj tutlande.

## KURSOJ KAJ EKZAMENOJ

En novembro komenciĝis la anoncita nova eldono de la kursoj de Esperanto en la UNED: Fine la nombro da aliĝintoj al ambaŭ niveloj (baza kaj meza) estas 30.

Daŭras la kurso en la sidejo. Post la kristnaskaj festoj probable komenciĝos kurso por progresantoj, se troviĝas intereso, ankaŭ gvidota de Andy. Se vi interesiĝas aŭ konas alian kiu ŝatus aliĝi al la kurso, bv kontakti kun la Liceo ĉe: madrid@esperanto.es.

En la lasta semajnfino de novembro, parte koincide kun la Virtuala Kongreso de UEA (+RETOSO de TEJO) okazis Monda KER-ekzameno. En ĝi partoprenis almenaŭ du homoj loĝantaj en Madrido: Albert Stalin Garrido, kaj Félix Jiménez Lobo.

## VIZITIS NIN

Nia franca amiko Frederiko Neyret venis al Madrido meze de novembro. La lundon 7an li vizitis la sidejon kaj kvar madridanoj vespermanĝis kun li. La merkredon 9an li kaj du madridanoj longe trapromenis la urbon kaj kune tagmanĝis.

## PLIAJ RENKONTOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sen aparta programo. Notu tamen ke pro la pluraj decembraj festoj, ni ne povos certigi la tutlundan malfermon, do bv antaŭe interkonsenti.

Ankaŭ la grupo de Fuenlabrado reprenis siajn kutimajn renkontojn, ĵaŭde vespere ekde la 17a horo.

Pro la Zamenhof-Tago, ĉimonate ne okazos unuasabata renkontiĝo. Ni revenos en januaro.




## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

FELIĈAJN FESTOJN AL ĈIUJ!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com